ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 9

SEPTEMBRO 2013 Kol.341/29

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: UK Rejkjaviko, Evento ĉe kongreso, Teatraĵo R.U.R, SES Martin

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La 98-a Universala kongreso en Rejkjaviko

20. - 27. 7. 2013



ISLANDO -- regno de neĝo kaj glacio -- vulkanoj kaj gejseroj. Ni ĝuis belegan libertempon en Islando, de kie mi sendas kelkajn fotojn.

Ni traveturis la sudan kaj nordan partojn de la insulo kaj ekde la 20-a ĝis la ĝis la 27-a de julio ni partoprenis la 98-an Universalan Kongreson de Esperanto en Rejkjaviko. Ni spertis impresajn travivaĵojn.

La naturo en Islando tute alie aspektas kaj foje ĝi elvokas lunan pejzaĝon. La panoramo ŝanĝiĝas ĉiumomente. Jen neĝkovritaj montoj, jen verdaj valoj, sur kiuj paŝtiĝas ŝafoj kaj ĉevaloj. Tuj poste oni traveturas nigrajn lafkampojn kaj musk-kovritajn ŝtonojn. Ni faris belajn naturekskursojn kaj per ĉiuterena aŭto ni povis penetri internen, kie ni admiris eksterordinare belan montaron karakterizatan de varieco de koloroj. Ravis nin kaskadoj de sennombraj akvofaloj, glaĉeroj kaj lagunoj (sur kiuj flosas glacipecoj), krateroj kaj vulkanaj rokoj, geotermaj fontoj, gejseroj, fjordoj... Ĉio tio kreas mirindajn scenojn kaj fascinajn momentojn. Islando estas malvarma kaj rigora lando, tamen admirinda. Por naturŝatantoj ĝi estas paradizo. Nur

la nestabila kaj ĉiumomente ŝanĝiĝanta vetero foje malhelpas bonan rigardon.
Jam la duan fojon okazis Universala Kongreso en Islando. Laŭ pluraj tiamaj partoprenantoj la lando multe ŝanĝiĝis. Ĉi-foje la kongreso okazis en moderna vitra konstruaĵo "Harpa", kiu estas centro por koncertoj kaj konferencoj. La partoprenantoj loĝis en apudaj aŭ en pli foraj hoteloj. Rejkjaviko estas la plej norda ĉefurbo en la mondo.

Inter kelkaj vidindaĵoj ĉe la marbordo okulfrapas brilanta ŝtala ŝipforma artaĵo, kiun admiras la preterpasantoj. Iom pli fore troviĝas la domo Höfdi, kiu famiĝis pro subskribita kontrakto inter la usona prezidento Reagan kaj la rusa Gorbaĉov por malarmiĝo. La dominanto de la urbo estas la plej alta preĝejo Hallgrímur. (vidu foton)

La kongreson partoprenis pli ol mil esperantistoj el 55 landoj. Sabate, la 20-an de julio posttagmeze la ĉina delegacio prezentis agadojn de "Ĉina Kulturo en Norda Eŭropo". Estis instalita vasta fotoekspozicio. Oni povis admiri kelkajn artaĵojn: kajtoj, papereltondaĵoj, brodaĵoj kaj aliaj. Post la solena ceremonio, kiun ĉeestis ĉinaj kaj islandaj altranguloj, oni malvualis buston de Konfuceo donacitan al la Islanda-Ĉina Asocio por kulturaj interŝanĝoj inter tiuj du landoj.
La sekvan tagon estis okazigita "Ĉina Tago" de ĉina E-Ligo. Dum ĝi oni prezentis diversajn aktivaĵojn el pasintaj jaroj kaj faris komentojn pri "Kultura diferenco inter la okcidento kaj oriento". La sabata vespero apartenis al la Movada Foiro, dum kiu oni renkontas multajn konatojn kaj eblas informiĝi pri la aktivaĵoj de diversaj E-asocioj.
La solena inaŭguro de la kongreso okazis dimanĉe la 21-an de julio. Lastan fojon prezidis ĝin kaj bonvenigis la partoprenantojn kaj honorajn gastojn la prezidanto de UEA Probal Dasgupta. La plej eminenta inter la ĉeestantoj estis la ŝtatestro de Islando, s-ro Olafur Ragnar Grímsson, kiu alparolis la publikon kaj deziris sukceson al la kongreso. Lia parolado estis varme aplaŭdata. Claude Nourmont laŭtlegis la mesaĝon de Luis C. Zaleski-Zamenhof - la nepo de nia Majstro. Sekvis salutoj kaj bondeziroj de diver-

saj asocioj kaj landaj reprezentantoj. Dum la paŭzo estis prezentita mallonga desegnofilmeto kaj pianmuziko. Posttagmeze jam komenciĝis serioza programo kun diversaj prelegoj kaj asociaj kunvenoj.

La komitato de UEA elektis tri novajn honorajn membrojn de UEA: Roland Lindblom, Biruta Rozenfelde kaj Hallgrímur Sæmundsson. Dum la dua kunsido de la komitato estis elektita la nova estraro kun la prezidanto Mark Fettes el Kanado. Oni atendas ŝanĝojn kaj novan strategion. UEA akceptis la 71-an landan asocion la Albanan E-Asocion. En la fermo de la kongreso estis anoncita la decido de la antaŭa estraro de UEA pri la aljuĝo de la Trofeo Fyne al Vjetnama Esperanto-Asocio. La nova prezidanto Mark Fettes transdonis ĝin al vjetnama junulino.

La kongresa programo estas ĉiam bunta, multaj programeroj okazas samtempe, do foje malfacilas elekti. Dum la semajno okazis diversaj prelegoj, konferencoj, diskutrondoj. Multaj asocioj havis okazon prezentiĝi kaj kundiskuti. Kunsidon havis instruistoj, fervojistoj, medicinistoj, juristoj, sciencistoj, vegetaranoj, ateistoj, komunistoj, SAT-anoj, ĵurnalistoj, verduloj, kat-amantoj, nefumantoj, blinduloj, radioamatoroj, komercistoj, samseksamuloj, legantoj de Esperanto kaj aliaj. Prezentiĝis pluraj religiaj asocioj pri: Kristanismo, Spiritismo, Ŭonbulismo, Oomoto. La kongresa temo "Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj" estis pritraktita dum la kongreso.



Ankaŭ en la ĉi-jara UK ne mankis tradiciaj programeroj, kiel ekzemple: Kleriga Lundo, Tago de la Lernejo, Centra Oficejo Respondas, Aŭtoraj duonhoroj, Aŭkcio, Oratora Konkurso, Belartaj Konkursoj, Ekumena Diservo, Ĝemelaj Urboj, tradicia urbodoma akcepto, prezento de venontaj UK-oj. Kunsidis Akademio de Esperanto, la komitato kaj subkomitatoj, fakaj kaj strategiaj forumoj.

Okazis serio da paroligaj lecionoj, oni povis iom lerni la islandan lingvon kaj sekvi prelegserion pri Islando. Allogis kurso pri la historio de Esperan-

to. Kongresanoj ĉeestis multajn aliajn interesajn programerojn. Aperis kvin numeroj de la kongresa kuriero “Aŭroro”. Ĉiuvespere ni ĝuis kulturajn prezentaĵojn. La ĉeĥa trupo prezentis teatraĵon bazitan sur la dramo de Karel Čapek “R.U.R.” - temas pri robotoj. Emocia estis violonludado de Sara Su Jones, usona denaska esperantistino, kiu kiel trijara knabino unuafoje surscenigis kaj ludis violonon en la 63-a UK en Varna en la jaro 1978. Jam tie ŝi rikoltis fortajn aplaŭdojn kaj admiron. Sian artan altnivelan pianludadon prezentis s-ino Alaniz el Argentino. Koncertis ankaŭ konataj E-muzikistoj, inter kiuj Kim el Danio, Emanŭel el Italio, Ĵomart kaj Nataŝa el Svedio, Edgar Piŝĉikas el Litovio.
Ne mankis KER-ekzamenoj, IKU-prelegoj, AIS-kursoj, bankedo kaj balo, nacia vespero, en kiu islandanoj prezentis siajn landon kaj kulturon. Impresis korusa kantado sur ŝtuparo antaŭ la grandega E-flago por plezuro ne nur de esperantistoj. La internacia vespero ĉiam konsistas el kontribuoj de la partoprenantoj. Aŭskultiĝis kantoj, poemoj, pian- kaj flutludado. Oni spektis teatraĵeton kaj dancojn. Ĉe la fino prezentiĝis ĉiuj artistoj komune kantante dum juna hungaro Csaba Slezák (prononcu Ĉaba) pianludis.

Tre variaj estis ĉiutagaj ekskursoj, dum kiuj ni ekkonis vidindaĵojn de la ĉefurbo kaj admiris ĉirkaŭaĵon kun nekutima, foje lunaspekta pejzaĝo. Ravis neĝkovritaj montaroj, riveroj, multnombraj akvofaloj, vulkanoj, rokoj, gejseroj, lafokampoj, azuraj lagunoj kun varma akvo, lagoj, flosantaj grandaj glacipecoj, vaporfontoj, paŝtiĝantaj ŝafoj kaj multaj ĉevaloj de speciala raso.

Oni donis al ni multajn informojn pri la lando, ĝia historio, sagaoj, pri geoterma energio kaj uzado de varmaj fontoj, pri la kaprica ĉiumomente ŝanĝiĝanta vetero kaj pri multaj aliaj interesaĵoj. Ni eksciis, ke la ekonomio baziĝas ĉefe je fiŝkaptado, turismo kaj prilaborado de aluminio. Islando estas multfaceta lando kun kuraĝaj homoj, kiuj devas alfronti malfacilan vivon en ne tre favoraj kondiĉoj, ĉefe en iuj internaj perditaj lokoj. Ĝi estas

mirinda lando, kie eblas tuŝi glaĉerojn, neĝon kaj nubojn transformiĝantajn en densan nebulon.

Liba kaj Floreal Gabalda

El la plumo de Jindřiška Drahotová:

Ĉu vi scias, ke Islando estas pli granda ol nia Ĉeĥa respubliko? Tamen ĉio tie estas tute alia.

Kiam mi rigardis pejzaĵon el la busa fenestro survoje el la flughaveno Keflaviko, mi vidis malgastaman grundon kun solaj blankaj dometoj en vasta ŝtona dezerto, mi pensis pri tio, kiel povas lokaj homoj ĉi tie sin vivteni. Ni veturis tra perfekta aŭtovojo kvindek kilometrojn ĝis la moderna belega urbego Rejkjaviko kun domegoj brilantaj per vitro, kun balkonoj kaj loĝioj.

Eĉ tie estis abundo da ŝtonoj kaj herbejetoj apud vojoj. Ili estis metitaj sur tavoletoj de la grundo. Vagante tra la urbo mi vidis nur belajn domojn, vilaojn kun ĝardenetoj en perfekta ordo, arbetojn, arbojn. Penega, konstanta, homa laboro! La plantoj estis la samaj, kiel sovaĝe kreskas ĉe ni. Strange, ke mi frumatene ne aŭdis kantbirdetojn kiel ĉe ni – sed senĉese flugis kaj kriis nur mevoj. Eble tion kaŭzis suno, kiu brilis kaj brilis.

La islandaj viroj ŝajne aspektis bravaj kaj gajaj, kontentaj kaj la virinoj sveltaj.

Oni diris, ke la klimato estas milda, la vetero ŝanĝiĝema, venta, surprize pluvema, kvankam malpli ol en Japanio. Ni povas miri. La kaŭzo estas varma mara, Golfa fluo kaj subteraj vulkanoj varmigas la akvon. La vintro daŭras 8 monatojn kun mallumo kaj grizlumo.

Pri tutgloba varmiĝo ili ne timas, eĉ ne pri degelo de glaĉeroj, ĉar pli varma maro signifas pli da fiŝoj, pli bonan kreskon de plantoj kaj arboj kaj se la surfaco de la maro plialtiĝos, kaŭze de turno de la terglobo, altiĝus la surfaco de la maro ie proksime de Japanio.

La ekonomio de Islando baziĝas sur fiŝkaptado kaj fabrikado de fiŝaĵoj, sur industria uzo de aluminio (la erco estas transportita el eksterlando) kaj sur turismo.

Strange ŝajnis al mi, ke sur herbejoj paŝtis sin pli multaj ĉevaloj (speciala islanda raso) ol ŝafoj kaj bovoj. Mi vidis nek ŝirmejon nek akvujojn por ili.
Ni loĝis en kvartalo, kie troviĝas lernejoj kaj universitatoj. Ideale estas lerni, kiam la lernejjaro havas mallumajn kaj duonlumajn tagojn kaj ferioj enhavas nekredeble longajn tagojn.
Ni vizitis kvartalon de bankoj, asekurejoj, oficejoj lokitaj en novaj imponaj palacoj komune kun luksaj hoteloj, ankaŭ lokojn, kie aromis frititaj fiŝoj en gastejoj. Mi ekskursis laŭ la „Sagaa Cirklo“ mirante pri la antikva kulturo de la insulo, pri akvofaloj, gejseroj, glaĉeroj kun pilgrimado de turistoj.

Mi vizitis la palacon Perlan sur la monteto, kie oni prilaboradas energion el subtera varmega akvo kaj eno servas kiel galerio, kafejo, restoracio, belvidejo kaj meze ŝprucas multmetra akva gejsero.

Kompreneble, ke plej multe da tempo ni pasigis en la palaco Harpa, kie okazis la kongreso de UEA. La konstruaĵo estis konstruita antaŭ du jaroj, ĝi estas granda kaj tre elegante ekipita.
Kaj nun iomete pri la kongreso mem: El Ĉeĥio estis aliĝintaj 27 esperantistoj. Sed bedaŭrinde ni ne veturis grupe, komune, kiel ekzemple antaŭ unu monato al la germana Herzberg, sed ĉiu memstare per diversaj aviadiloj, ĉiu ricevis tranoktadon en alia loko. Kiam mi kun du geamikoj per la aviadilo alflugis al Keflaviko kaj poste buse atingis la kongresejon, ni ricevis kongres-materialon kaj iris serĉi la menditan amasloĝejon.
Helpe de mapo ĉe neagrabla forta vento kaj komenciĝanta pluvo ni finfine trovis la lernejon, kie en la klaso jam estis paroj: denaska japano Leo kun sia pola koramikino, ĉina esperantistino Ĉi kun sia amiko Dieter kaj ni. Pro la malbona pluvvetero kaj laco ni jam ne revenis al la kongresejo.
De dimanĉo, kiam estis inaŭgurita la kongreso, post la salutvortoj de multaj land-delegitoj sekvis la programoj. La nacia vespera programo prezentis vikingojn, specialan islandan luktadon, versaĵprezentojn kaj kantojn

de islandaj verkoj, alterne prezentitaj Esperante kaj islande ktp. La prezentado de infana orkestro de speciala muziko ricevis longan aplaŭdon.

Interesaj estis prelegoj pri la islanda lando, kiuj estis dividitaj tra kelkaj tagoj kaj tiel ni ekzemple estis informitaj, ke vikingoj ne uzadis kompason, sed ili navigis la ŝipojn laŭ la vetero.
Sekvis pluaj programoj, kutimaj ĉe ĉiuj kongresoj: koncertoj, teatraĵoj, pluaj interesaj prelegoj, paroligaj lecionoj, oratora konkurso, dancbalo, sed ĉefe tuttagaj ekskursoj al akvofaloj, gejsero ktp. Interesa estis por mi ankaŭ la rakonto de la finnino Siru Laine pri siaj spertoj. Ŝi venis kiel vartistino por prizorgi knabojn en islanda familio. Ŝi ne konis la lingvon kaj komencis studi en universitato de Islando. Nun ŝi preferas Islandon al Finnlando.
La kongresa semajno finiĝis. La revenvojaĝo-frumatene per buso al la flughaveno, tra Oslo al Helsinki, vespere mi en pluvego venis hejmen.

J. Drahotová

Okazaĵo ĉe la kongreso

Estis solenaj salutoj ĉe la malfermo de la 98-a UK, la 21-an de julio en la kongresejo, kiu nomiĝas HARPA. Nome de Kostariko salutis unu el 3 partoprenantoj (vidu la Jarlibron de UEA). La duan tagon ni hazarde renkontiĝis ĉe la tablo, havante nian malabundan tagmanĝon. Mi alparolis lin, kiel oni kutimas, kaj li „varmiĝis“, ke siatempe li korespondis kun Milada Josková (delonge ŝi jam ne vivas), ke li du-foje vizitis Pragon, kaj tiel lin kaptis la trista historio de la vilaĝo Lidice, ke tiun nomon li donis al sia pli juna filino: LIDICE!
Kiel ŝi kreskis (nun 22-jaraĝa), oni fotografis la infanon kaj faris albumon, kiel kutimas. Sed – ke ŝi profunde estimu sian nomon, li kortuŝe rakontis al ŝi pri la terura evento. Kaj ĉe la komenco de la albumo li lokis fotografaĵojn de la vilaĝo, de la okazo. Se liaj konatoj miras pro la nekutima nomo – li sciigas ankaŭ al ili la historion...

„Sed mi havas ankaŭ pli aĝan filinon, 25-jaran. Kaj ŝi nomiĝas KARLIN" rakontis Salazar Alvarado plue. „Ho, ĉu vi tiel ekŝatis Pragon, ke vi nomumis ŝin laŭ iu praga kvartalo?“ demandis mi. „Ne precize tiel, sed tamen – ankaŭ tiu ĉi afero koncernas Pragon.“ Kaj li klarigis jenon: „ Imponis al mi la universitato de KARLO la IV-a. Sed la finaĵo - „o“ - estas en la hispana lingvo finaĵo vira – kaj mi havis filinon. Do, aplikante la Esperantan - „ino“ - mi ricevis KARLINO. Sed – denove tiu „o“ - finaĵo. Laŭ la 16-a regulo de la Fundamento mi forigis ĝin. Kaj finfine ekestis KARLIN – la taŭga nomo por mia filino. Nur poste mi eksciis, ke en Prago ekzistas tia kvartalo... Mi kredas, ke iamaniere mi estas ligita kun tiu ĉi urbo. Entute al mi ŝajnas, ke niaj nacioj havas ion komunan, mi ne povas tion ekspliki, sed mi tion sentas!“

Kaj, por ke la kara Salazar kaj lia filino Lidice (ankaŭ esperantistino) havu nerompeblajn kontaktojn kun nia lando, mi donacis por la filino la libron „La fabelputeto de panjo“ (Maminčina pohádková studánka), kies aŭtorino estas Kamila Bártlová. Ke estiĝu fortaj kontaktoj de nacio al nacio, de koro al koro.

Margit Turková

Teatraĵo R.U.R. antaŭ milo da spektantoj

La komenco estis en literatura konferenco OSIEK, kiu okazis en la jaro 2012 en la ĉeĥa urbo Svitavy kun la ĉeftemo "scienc-fikcio kaj robotoj en E-literaturo". Kaj kiu estas pli fama aŭtoro de tiutemaj libroj ol Karel Čapek? La plej elstaraj verkoj estas "Milito kontraŭ salamandroj" kaj la dramo "R.U.R". Ambaŭ prezentis Petro Chrdle en sia eminenta prelego, sed hodiaŭ ni parolu nur pri la jena: Rossumaj Universalaj Robotoj – jam la vortoj ekscitas nian scivolon, ĉu?

Ni estas dum estonta tempo sur insulo, kie estas fabrikataj mekanikaj homoj anstataŭontaj la verajn por ĉiuj laboroj. La artefaritaj laboristoj ekribelis kontraŭ homoj, elmurdis ilin, sed poste konstatis, ke ili ne kapablas produkti novajn robotojn. Ili petas la lastan, ankoraŭ vivantan homon pri helpo, sed tiu estas sen espero ĝis la momento, kiam aperas du laste fabrikitaj gerobotoj, kiuj sin amas reciproke, kapablas eĉ riski la vivon unu pro la alia kaj tiel pruvas sian homiĝon. La dramo avertas, ke la tekniko povas likvidi nian civilizon. Do enkadre de preparoj de la konferenco la aktivaj

estroj de la Esperanto-muzeo en Svitavy instigis lokan studentan teatro-grupon studi kaj prezenti la dramon R.U.R. (aldono de J.Hron)

Jen kion diris al ni la reĝisorino Radka Oblouková: "Nia grupo ekzistas jam de la jaro 1994. Intertempe frekventis ĝin multaj junaj homoj, studentoj kaj eĉ lernantoj de bazaj lernejoj. Ni preparas diversajn teatraĵojn kaj prezentas ilin en nia urbo kaj en kelkaj regionaj festivaloj.

En la jaro 2011 petis nin Petro Chrdle, ke ni preparu por la internacia konferenco OSIEK (Organiza Sekcio de Internaciaj E-Konferencoj) la nomitan dramon de K. Čapek en la lingvo Esperanto. Kelkajn monatojn daŭris la preparado de la scenaro, fare de mia kolegino Tereza Kopecká unue en la ĉeĥa kaj poste, kun helpo de esperantistoj, en Esperanto. Por nia amatora junulara grupo estus la verko tro malfacila, tial ni iom koncizigis ĝin, sed ekkaptinte la gravajn ideojn de la dramo.

Inter la aktoroj estis nur unu juna esperantisto, ĉiuj aliaj devis la lingvon lerni helpe de li kaj de aliaj esperantistoj. Kiel ni sukcesis, povis prijuĝi spektintoj de la prezentaĵo en nia loka teatro "Trám". Krom esperantistoj, ĉeestantoj de la jam menciita internacia konferenco, ĉeestis ĝin multaj niaj kunstudentoj, profesoroj kaj parencoj, kiuj plejparte unuafoje aŭdis Esperanton.

Ĉi-jare printempe ni prezentis la teatraĵon ankoraŭ dufoje. En Brno okaze de la festivalo de fremdlingvaj teatraĵoj kaj en Prago okaze de simila afero. Sed tio estis nur ŝtupoj al la pinto: Imagu, ke ni, amatoraj aktoroj, estis invititaj prezenti la dramon antaŭ la partoprenantoj de la Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko ĉi-jare en julio. Por ke ni digne prezentu nin mem, la esperantistaron en nia urbo kaj de nia lando kaj precipe la mondfaman ĉeĥan aŭtoron Karel Čapek, ni devis multe, multe trejni nin.

Jam la flugvojaĝo al Islando estis malgranda "dramo". Partoprenanto de la kongreso kaj kunaktoro en nia teatraĵo, ĉeĥa esperantisto sinjoro Řepa, de

siaj kamaradoj nomata Fidel, dum la flugo suferis kor-malsanan kolapson kaj devis esti sub prizorgo de kuracisto. En la rejkjavika flughaveno jam atendis lin ambulanco kaj forveturigis lin en malsanulejon. Tamen la sekvantan tagon Fidel, jam en bona stato, venis inter nin. Komune ni aŭskultis salutvortojn de delegitoj el kelkaj kontinentoj, ni estis fascinitaj. Sed la malbona situacio por nia kolego Fidel ripetiĝis kaj li devis esti denove transportita en malsanulejon.

Kiel oni diras: "Malbona komenco, bona fino!" Nia prezentado en la belega ĉefsalonego de la koncerta domo "Harpa" okazis antaŭ preskaŭ 1000 spektantoj sukcese. Ni pro tio dankas ankaŭ al la organizantoj de la kongreso kaj teĥnikistoj, kiuj preparis por ni taŭgan teatran medion en halo, kie normale ne okazadas teatraĵoj, nur koncertoj. Ja por nia scenejo ni bezonis kulisojn kaj rekvizitojn – dratojn, tubojn ktp.– por fari internaĵon de fabriko. S-ino manaĝerino veturis kun ni al rejkjavika forĵetaĵejo kaj ĉiuj afable helpis al ni elekti la bezonatajn aferojn.

Kiel reĝisorino mi kun la ĝojo sekvis favoran ligon de la spektantoj al la prezentaĵo, ilian harmonion kun la aktoroj, inter kiuj estis s-anoj Petro Chrdle kaj Jan Řepa. Simple ni ĝuis belegan etoson en tiu plena granda salonego. Ĝi estis sorĉe bela travivaĵo por nia tuta ensemblo."

Margit Turková, Josef Hron

230 samideanoj el 27 landoj

partoprenis la Someran E-studadon en la slovaka urbo Martin ekde la 12.-20.7.2013. Plej multe da samideanoj alveturis el Germanio, Pollando kaj Slovakio: de tiuj landoj venis po 40 personoj, el Ĉeĥio 13, ĉefe de juna generacio... La urbo Martin estas belega, ĉirkaŭita de montokresto, kun panoramo al Malgranda kaj Granda Fatroj. La programo de la semajna lingva kurso estis riĉa. Antaŭtagmeze estis E-instruado, ĉiam tre interesa. La partoprenantoj estis divi-

ditaj laŭ nivelo de sia scio (laŭ antaŭa skriba testo) en dek grupojn. Ekzemple anino de nia asocio Zdenka Novotná estis lokita en la sepa klaso, kie, laŭ ŝia komento, estis la plej gaja medio. Ŝi diris al ni: „En nia klaso estis „gelernantoj“ el Ĉeĥio, Francio, Kanado, Koreio, Germanio, Aŭstrio, Rusio, Slovakio, Hispanio, Svedio kaj Ukrainio. Sume 24 gelernantoj. La instruisto estis anglo vivanta en Francio Tim Morley, li kapablas instrui en kvin lingvoj, sed li regas eĉ pli multajn. Li scipovis per ŝerca formo klarigi lernomaterialojn, korektis francojn kaj germanojn pro malbona prononcado de silaboj. Tiumomente li gestis per la manoj ĉe sia kapo, kvazaŭ ŝajnigante „azenajn orelojn“ kaj la lernantoj tuj klopodis korekti sin. Kiam iu forgesis finaĵon de la akuzativo, ĉiam li piedfrapis kaj postulis de la lernantoj la samon, kiam la finaĵon forgesis li mem. Li ankaŭ asertis, ke estas bone erari, por ke estu eble korekti. En la ceteraj ĉambroj regis silento, ĉe ni estis ĉiam gaje.

Plua nia „studentino“ Lenka Angelová, el la klaso 8, rakontis, ke ĉiuj admiris la blindan germanan samideanon, kiu danke al sia eminenta memorkapablo klopodis egaliĝi kun la ceteraj. Kvankam li ne vidis la tekstojn sur la tabulo, li nur aŭdis, kion liaj kolegoj diris al li. La instruado do estis iom aliforma, tamen tre interesa.

La posttagmezoj estis dediĉitaj ne nur al prelegoj, sporto, ludoj, kantado ĉe gitaro, sed ankaŭ al paroligaj rondoj kaj ekskursoj, laŭvole de la partoprenantoj. Interesa estis la „servo de flavaj anĝeloj“, kiuj helpadis solvi problemojn de ne tre spertaj esperantistoj.

Dum la ekskursoj la partoprenantoj trarigardis la urbon Martin, la proksiman subĉielan muzeon, burgon Orava, minejon kaj stampejon de moneroj en Kremnice. La tuttagaj ekskursoj celis al la kastelo Bojnice (kun zooparko) kaj al la montaro Altaj Tatroj.

Al la vesperoj apartenis koncertoj, kvizoj kaj diskotekoj. Dum la adiaŭa vespero la partoprenantoj eksciis kelkajn interesaĵojn. La plej juna partoprenanto estis trijaraĝa nigruleto Nuri el Svedujo, male la plej aĝa estis 84-jara eleganta hispanino Dolores Godoy Rotllens. Aprezita estis ankaŭ slo-

vaka familio kun la plej granda kvanto da partoprenantoj gepatroj kaj kvar infanoj. Plej multajn kilometrojn devis vojaĝi Koreino – 8 mil kilometrojn al Slovakio kaj 8 mil kilometrojn reen.
La semajno de studado rapide forflugis, sed ĝi estis belega, agrabla. Estis agrable reveni al la lernojaroj de la juneco. Venontjare oni planas aranĝi Esperantan someran lernejon denove en Slovakio, en la urbo Nitra. Ni klopodos denove partopreni kaj la saman ni rekomendas al la legantoj de nia gazeto Informilo.

Laŭ Z. Novotná kaj L. Angelová esperantigis P. Nechvíle

.

Informo por ĉeĥaj legantoj:

Ti, kteří mají zájem číst knihy původně psané v esperantu, ale nemají dost času nebo trpělivosti, nyní mohou tyto knihy získat elektronicky v češtině na www.bezvydavatele.cz . Tam je možno najít kupř. "Život Andrea Csecha, pedagoga 20. století" nebo "Pohádky ze všech koutů světa vám přináší esperanto", "Evropou a Asií na kole a s esperantem" od Luciena Peraire, "Chromozomy vraha" od Lorjaka a další budou následovat. J. Drahotová

Tristaj informoj:
La 29.7.2013 en la aĝo de 88 jaroj forpasis la membrino kaj multjara funkciulino de la praga E-klubo Helena Maudrová.

Nur du tagojn antaŭe la 27-an de julio 2013 mortis la praganino Eva Hoffmannová, 74-jara. Honoron al ilia memoro ! red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh-ikeh@volny.cz** interreto: **www.volny.cz/aeh-ikeh**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo= 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA : aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.